

## & La propaganda taĉmento:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 490 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931) kun enkonduko: "Dum tiu ĉi kunveno nia konata propagandisto Delanoue faris tre interesan eksperimenton: Li prezentis samideanojn el diversajnacioj kaj la publiko tiel povis konstati, ke la elparolado de Esperanto estas ĉe ĉiuj absolute la sama." (*El gazetraportoj.*). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por &"Miskompreno".>

### (#Melodio:

<:18>

(/domi somi lami soso; fare mido reTi do; domi somi lami soso; fare mido reTi do;

(#Rekantaĵe: so3mi domi reeredo TiSo; so3mi domi reeredo TiSo; domi soosomi laalami soso; fare mido reereTi SooLaTi doTi do o)

)×14 )+

### (&Strofoj:

'1 /Kio blovas kiel vento ; Tra la stratoj de l' kvartal'? ; Estas propagandtaĉmento, ; Kiu kuras al batal'.

(×:; **Kantu nun per forta la voĉo ; Kantu laŭte kaj dum diboĉo ; Kaj ni laŭdu, ne aŭdu riproĉon ; Kantu nun per forta diboĉa la vorta voĉ'.**)

'2 En bonordo, rapidkrure ; Sin direktas al Sorbon' ; Sampson, Major, Niŝimura, ; Kornfeld, Ajsberg kaj Solson'. ....

'3 Kial tie la publiko ; Premas sin al rendevu'? ; Tion faris kun taktiko ; Generalo Delanu'. ....

'4 Kaj kun li, la varbterura, ; Nun alvenas al Sorbon' ; Sampson, Major, Niŝimura, ; Kornberg, Ajsor kaj Solson'. ....

'5 Ĉie, kie homoj sidas ; Pace kun scivola sent', ; Tuj la general' prezidas ; La paradon de l' taĉment'. ....

'6 Li prezentas la soldatojn; Ĉiu estas fenomen',; Kaj li citas naskiĝdatojn ; Kundetaloj de l' deven': ....

'7 "Jen ĉi tiu juna viro ; Ĵus alvenis el Jugland' ; Kaj fariĝis jam martiro ; De l' moderna propagand'. ....

'8 Nun li pruvos tuj perfakte, ; Ke li, kiel vi kaj mi, ; Elparolas plej ekzakte.." ; ..Kaj la viro diris "i"! .....

'9 "Kajĉi tiu dika tipo ; Kun kolumo el karton' ; Estas ido de l' polipo ; Kajde ina saksofon'; .....

'10 Li parolas ĝenerale ; Per konvena buŝotru'.." ; ..Kaj la tipo laŭsignale ; Tute klare diris "u"! .....

'11 "Nun ĉi tiu, kiu tenas ; Unu fingron en la naz', ; Estas – kiel vi divenas – ; Negro de l' plej nigra ras', .....

'12 Li eĉ estas delegito ; En Afrik' de l' U. E. A..." ; ..Kaj la negro laŭ invito ; Tre aŭdeble ruktis "a"! .....

'13 La publik' aplaŭde gestis ; Kun konvinko, kun kompren', ; Kaj plejbrue manifestis ; Sian ĝojon pri la scen'; .....

'14 Kaj mi aŭdis eĉ deklari ; Grizan patron de l' scienc': ; "Kion oni povas fari ; Per dresad', kun pacienc'!" .....